# 🌿 RAPORTO PRI LA ESPERANTA SEMINARIO DE OKTOBRO 2025

De la 25-a ĝis la 30-a de oktobro

**Kultura kaj Kristana seminarioj**

La seminario okazis de la 25-a ĝis la 30-a de oktobro 2025. Ĝi konsistis el kultura seminario (3 tagoj) kaj kristana seminario (2 tagoj), kunorganizitaj de la Esperanto-klubo sub gvido de s-ino Ranja Zafinifotsy kaj de s-o Ulrich Matthias.



## 👥Partoprenantoj

**Entute ĉeestis 49 partoprenantoj: 1 el Litovio, 1 el Germanio, 7 el Mananara, 7 el Fiadanana, 7 el Manjakaray, 6 el Andoharanofotsy, 20 el Anosibe – École Île aux Enfants.**



# 🎭 I. KULTURA SEMINARIO (25–27 oktobro

La kultura parto estis riĉa je prelegoj, prezentoj kaj interŝanĝoj pri malagasa kulturo, edukado kaj la rolo de Esperanto kiel ponto inter popoloj.



## 🔹 1. Famadihana

Prelego pri la malagasa tradicio de famadihana ( novtukkovriĝo de mortintoj). La preleginto, Lydia klarigis ĝian signifon kiel simbolo de respekto al la prapatroj, familia kunligo kaj kolektiva memorado. Ŝi parolis ankaŭ pri la spirita kaj socia rolo de tiu kutimo en la malagasa socio.



# 2. Amikeco naskiĝis de Esperanto

Partoprenantoj kundividis spertojn pri kiel Esperanto kreas pontojn inter homoj, eĉ el diversaj landoj. Ili montris konkretajn ekzemplojn de internaciaj amikecoj, korespondado kaj komunaj projektoj naskiĝintaj danke al la lingvo.



# 3. Kuirarto


Erica, unu el la gelernantoj, kiu sekvas profesian kuirartan trejnadon ĉe Ile aux Enfants, parolis tre interese pri la rilato inter kuirado kaj Esperanto.
Li diris, ke oni ne devas timi erari, ĉar bruligita manĝaĵo ne estas katastrofo, same kiel paroli kun eraro ne estas peko.
La plej grava estas prakti, lerni kaj kuraĝi daŭrigi, ĉu en la kuirejo, ĉu en la lingvo.



# Literaturo – Verkoj de Ranja kaj Navalona

Prezentiĝis kvin libroj de Ranja Zafinifotsy kaj unu verko de Navalona. La aŭtorinoj klarigis la enhavon de siaj libroj, kiuj temas pri amikeco, vojaĝoj, la naturo kaj la vivo de infanoj en diversaj landoj. Tiuj libroj montras, ke Esperanto povas esti ilo por instrui valorojn kaj krei pontojn inter kulturoj.















# 6. Projektoj en Afriko

Prelego pri diversaj projektoj realigitaj de esperantistoj en Afriko: edukaj programoj, orfaj asocioj, ktp...
Oni montris, ke Esperanto ne estas nur lingvo, sed ankaŭ ilo por konkretaj agoj en la socio.

# 7. Projekto de la klubo de Mananara

La partoprenantoj el Mananara prezentis sian lokan projekton pri mediateko kaj kursoj de informatiko.
Ili klarigis la celojn de la projekto: plibonigi la aliron al informoj, teknologio kaj edukaj rimedoj por la junuloj de sia regiono.






# II. KRISTANA SEMINARIO (28–30 oktobro

La kristana parto celis profundigi la spiritan vivon de la partoprenantoj kaj montri la rilaton inter kredo kaj la esperantista etiko.



## 1. Karitato kaj pardonado – la malŝparema filo

La rakonto de la malŝparema filo el la Biblio (Luko 15:11–32) estis interpretita por montri la valoron de amo, rekono kaj reveno al la vero.

Oni diskutis, kiel pardono povas liberigi la koron kaj restarigi la pacon en la familio kaj komunumo.



# 2. La valoroj de la evangelio

Ĉi tiu prelego listigis la ĉefajn evangeliajn valorojn — amo, humileco, fideleco, honesteco — kaj klarigis, kiel apliki ilin en la ĉiutaga vivo.
Partoprenantoj kundividis proprajn spertojn kaj ekzemplojn.






# 3. La avantaĝoj esti kristanoj kaj esperantistoj

Oni montris, ke esti kristano signifas sekvi la vojon de amo kaj justeco, kaj esti esperantisto signifas serĉi pacon kaj interkomprenon.
Ambaŭ kune formas vojon al pli bona mondo.




## 4. Honesteco en la familio

La temo instigis la familiojn esti travideblaj, fidindaj kaj amemaj.
Oni emfazis, ke honesteco estas fundamento por stabila kaj feliĉa hejmo.

## 5. Mizerikordo en kristana pentroarto




Prelego pri kiel artistoj esprimis la mizerikordon de Dio tra pentraĵoj kaj skulptaĵoj.
Oni lernis, ke arto povas esti potenca ilo por preĝi kaj mediti.



## 6. La vivo de Sankta Paŭlo

Rakonto pri la konvertiĝo, vojaĝoj kaj misio de Paŭlo, la apostolo de la nacioj.
Oni montris, kiel lia ekzemplo inspiras la hodiaŭajn kristanojn resti fortaj en la



## 🎶 Kantoj, Naĝado kaj Kuneco

Dum la seminario, ni ne nur lernis kaj aŭskultis prelegojn — ni ankaŭ ĝuis belajn momentojn de komuna kanto. La partoprenantoj kantis esperantajn kantojn, kristanajn himnojn kaj tradiciajn malagasajn melodiojn. Tio kreis etoson de ĝojo, unuigo kaj frateco.
Krome, dum la libertempo, multaj partoprenantoj kune naĝis en la naĝejo, kio estis tre ĝuebla kaj helpis plifortigi amikecojn inter la infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj. La naĝado donis al la seminario gajan kaj energian etoson.





# 🚌 Postseminaria Ekskurso

Post la fino de la evento, ni organizis eksurson por ĉiuj partoprenantoj. Tiu tago estis dediĉita al ripozo, kuneco kaj malkovro de la ĉirkaŭa medio. La ekskurso permesis al la partoprenantoj pasigi kvalitan tempon kune, krei memorojn kaj plifortigi la ligon inter la diversaj Esperanto-kluboj kaj niaj eksterlandaj gastoj.




# 🌈 Konkludo

La ses-taga seminario estis vera sukceso.
Ĝi montris, ke Esperanto povas esti ilo ne nur por lingva lernado, sed ankaŭ por kultura renovigo kaj spirita kresko.
La partoprenantoj revenis hejmen kun plifortigita kredo, pli granda amo al sia lando kaj nova deziro servi al Dio kaj al la socio per Esperanto.